

# INTERNACIA FERVOJISTO




**ORGANO DE I.F.E.F.**  
**INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO**

32a jaro

Novembro-Decembro 1980

N-ro 6



REGENSBURG, la kongresejo KOLPING-HAUS

## ATAKO KONTRAŬ IFEF-ANOJ

En "Heroldo de Esperanto" mi legis "leteron de leganto" kun titolo "Ne hontu uzi Esperanton". Skribis ĝin partopreninto de nia 32a IFEF-kongreso en Amerika. Legiĝas tie la frazoj: "La kongresanoj portis belajn, okulfrapajn kongresinsignojn, sed ne uzis la Internacian Lingvon, preskaŭ ĉiam babila en naciaj lingvoj. Tiu, internacia 300-persona grupo estis bona videbla, sed ne aŭdebla. Kial?" - Kaj la skribinto poste daŭrigas: "Ĉi-jare en Amerika estis perdita bona ŝanco montri al multnombraj turistoj, kiel funkcias la lingvo."

Ĉu prave?

Nu, eĉ se oni konstata, ke la asertoj iom troigas, la skrib-

into bedaŭrinde almenaŭ ne malpravas. Ofte vere aŭdiĝis naciaj lingvoj, kaj mi timas, ke tiuj, kiuj ĉefe "kulpas" la aperigon de tiu letero de leganto, eĉ ne legas la liniojn, kiujn mi jen submetas al ili, sed ĉefe alla partoprenontoj de la venonta kongreso. Kaj ne nur al ili.

Ni ĉiuj sentu nin prave atakitaj de tiu observemulo. Ni ĉiuj estonte pruvu, ke kaj kiel glate funkcias nia lingvo. Ne nur en kongreso, sed ĉiam kaj ĉie. Gravega tasko por la parolkapabluloj inter ni, ke ni gvidu tiujn, kiuj ankoraŭ timetas, uzi la lingvon, al sama kapablo. Ĉiudevas komenci, sed ankaŭ ĉiu povas progresi. Kial do ni nomas nin "esperantistoj"?

J.G.

## SALUTOJ

Okaze de la kristnaskaj festotagoj kaj la transiro al nova jaro la estraro de IFEF kore salutas ĉiujn membrojn, landajn asociojn, kunlaborantojn kaj amikojn de IFEF.

Ni dankas pro agrablaj rilatoj dum la baldaŭ pasinta jaro kaj deziras al ĉiuj fortojn kaj entuziasmon en la daŭra laboro por IFEF kaj ties idealoj.

IFEF-estraro

## INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

Sekretariejo: E Henning Olsen, Åderupvej 182, DK-4700 Næstved.

Redaktoro:

Guy Delaquaize, 52, rue L.-Gandillet, F-78420 Carrières/Seine.

Bankkonto: Provinsbanken, Konto 7353-350550, DK-9800 Hjørring.

## 33a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (IFEF) EN REGENSBURG (FR Germanujo)

15a - 21a de Majo

Kongresadreso:

33a IFEF-kongreso, Wiener Str. 121,  
D-6000 Frankfurt (M) 70  
Tel (0611) 65 73 65

Kongresejo:

Kolpinghaus St. Erhard,  
Adolph-Kolpingstr.1, D-8400 Regensburg  
Tel. (0941) 55 800.



## REGENSBURG urbo de la 33a IFEF-Kongreso

La 32a IFEF-Kongreso disvolvigis en la idilia feriocentro Amerika, ne tro proksima al la nederlanda urbo Eindhoven. Kontraste al tio la partoprenontoj de la 33a IFEF-Kongreso vivos dum unu semajno en la germana urbo Regensburg ĉe la rivero Danubo.

Tiu regiono estas loĝigita jam depost ses mil jaroj. La Keltoj nomis sian kolonion Radasbona. La invadintaj Romanoj fondis tie unue soldatan kampon, poste potencon fortikaĵon. Ĝi nomiĝis "Castra Regina". El la romana periodo konserviĝis la pordego-restaĵo "Porta Praetoria". Dank' al tie trovita ŝtona tabulo oni konas precize eĉ la fondadon de la urbo kaj festis ĝian 2000-jaran ekziston en 1979. El la fortikaĵo evoluis civila loko. Ne mirinde, ĉar la rivero Danubo akceptas tie kvar flankajn riverojn kaj donis la bazon por forte kreskanta ekonomio.

Sed ankaŭ la romana fruktedona periodo finiĝis. La nomo ŝanĝiĝis en Reganespurc. En la jaro 530 la loko fariĝis bavara ĉefurbo kaj poste imperiestra re-

zidejo de la Karolidoj, urbego duka, reĝa kaj episkopa, eŭropa komercometropolo en la frua kaj malfrua mezepoko. Kiel blazonon la burĝoj elektis du krociĝantajn ŝlosilojn, kiuj aperas ankaŭ en la kongreseblemo de IFEF. La fama "konstanta Regna Parlamento" havis sian sidejon inter la jaroj 1663 kaj 1806 en la Malnova Urbodomo. En ĝia historiera salonego la urbo akceptos la kongreson. Kiu deziras rigardi la origine konservitan tortur-demandejon, grimpu malsupren al la kelaj ĉambroj kaj karceroj.

Do la urba kerno de Regensburg estas markita de la mezepoko. La Ŝtona Ponto konstruita en la 12a jarcento nuntempe toleras ankaŭ la aŭtomobila trafikon. Super pintaj tegmentoj kaj turoj leviĝas la dutura katedralo de la Sankta Petro konstruita inter la 13a kaj 16a jarcentoj. Ĝi estas taksata ĉefverko de la gotiko en Sudgermanio. Ĉiun dimanĉon matene estas tie aŭdebla la mondkonsta knaba ĥoro "Katedralpaseroj".

Al la vidindaĵoj inter multaj aliaj apartenas la rokokostila

Malnova Kapelo, kie la kongresanoj ĝuos altkvalitan koncerton. En la preĝejo Sankta Emerano, kies fondiĝo datas el la 5a jarcento, okazos la ekumena diservo. Laŭ itala stilo kaj unike de la Alpoj riĉaj patricioj konstruis en la 13a kaj 14a jarcentoj turdomojn, el kiuj konserviĝis kelkaj ĝis hodiaŭ. Vizitebla, almenaŭ parte, estas la 500-ĉambra kastelo de la Princo Thurn kaj Taxis, pri kies grandskala edziĝfestoj en 1980 la ilustritaj gazetoj raportis amplekse.

La nuntempa urbo Regensburg prezentas sin multfacete. Diversspecaj industriaj entreprenoj havas sian sidejon. Bedaŭrinde la fervoja direkto likvidiĝis antaŭ kelkaj jaroj sekve de la raciigo. Placé aspektas la renovigita stacidomo. Regensburg posedas multe frekventitan havenon, universitaton, altlernejon kaj ĉiujn antaŭkondiĉojn por vivi agrable.

Facile atingebla estas la kongresejo, nomita Kolping-Haus, proksimume 15 minutojn for de la stacidomo. Al la vidindaĵoj estas nur kelkcentoj da paŝoj. En la vestiblo troviĝas la akceptejo, en la unua etaĝo salonoj kaj la salonego, ekspozicio, librovendejo kaj dum certa tempo poŝta ĝiĉeto. La restoracio ofertas manĝojn kontraŭ antaŭe aĉetitaj kuponoj favoreprezaj. Sidante sur la ekstera teraso oni povas pasigi paŭzojn.

Menciinda estas, ke la kongresanoj alvenintaj per trajno trovos en la stacidomo informojn, kie helpantoj klarigos la vojon al la hoteloj kaj pensionoj, kondiĉe ke oni aliĝis antaŭe kaj ricevis kongreskarton kun

indikita hotelo. Do ne necesas veni unue al la kongresejo.

LKK forte esperas, ke la favoraj antaŭkondiĉoj, precipe la malgrandaj distancoj, stimulu al baldaŭa aliĝo, ĉar pri sukceso kaj reputacio de Esperanto decidas nelaste ankaŭ la nombro de la kongresanoj.

La programo promesas esti eble plej varia. Grava estas kiel ĉiujare la fervojfaka akcento en formo de fakprelego, kunsidoj de la terminara kaj fakprelega komisionoj, de estraro kaj komitato kaj de aliaj komisionoj. Ne mankos kompreneble la tradiciaj aranĝoj ekz. interkona vespero, solena malfermo en ĉesto de eminentuloj, internacia balo, folkloraj kaj koncerta vesperoj. Eĉ magia vespero ne mankos. Lingve interesitaj personoj povos partopreni specialajn kursojn. Por atentigi la publikan intereson kaj kontakti kun la enloĝantoj diversaj manifestacioj estas projektitaj.

La kongresanoj vizitos la urbajn vidindaĵojn kun spertaj gvidantoj, kaj ili povos partopreni tri ekskursojn per aŭtobusoj kaj ŝipoj, kiuj aparte estos priskribataj. Se ankaŭ la vetero montros sin tiel favora kiel dum la antaŭaj jaroj, ankaŭ la 33a IFEF-kongreso en Regensburg fariĝos sukcesplena evento en la historio de la internacia fervojista Esperantomovado. Kiel ĉiam gastoj estas bonvenaj des pli multe, ĉar en 1981 la Universala Kongreso okazos en Sudameriko, kien multaj adeptoj de Esperanto ne povos vojaĝi pro financaj kaŭzoj.

LKK de la 33a IFEF-kongreso.

## KOREKTO RILATE AL LA LOĜIGO

Kontraŭe al la antaŭa publikigo ne la trafikoficejo de la urbo Regensburg konfirmos la loĝigon, sed la LKK. La nomo de la kongresna hotelo resp. de la pensiono estas indikita sur la kongreskarto, kiun la kongresano ricevos antaŭe.

## EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO

En la kadro de la 33a IFEF-kongreso en Regensburg germanlingvanoj havos okazon partopreni la ekzamenon de la Germana Esperanto-Instituto por atingi la ateston pri lingva kapableco. Versajne la skriba parto okazos lundon, la 18an de majo je 9.00 h kaj la buŝa parto merkredon, la 20an de majo je 9.00 h. Interesuloj el ĉiuj landoj, kiuj regas la germanan lingvon povos partopreni. Fritz Lautenbach, Abtstor 21, D-6400 Fulda (deĵoradreso: Bahnhof Fulda) akceptas aliĝilojn kaj volonte donas informojn.

## KOMUNIKO DE AFEF

Dum la lasta kongreso AFEF proponis sendi al la IFEF-kongreso ĝejunulojn (malpli ol 28-jarajn) kun financa subteno de la landaj asocioj, por instigi ilin al pli vigla partopreno kaj kunlaboro en la movado.

Por la sekvonta (33a) kongreso en Regensburg, AFEF jam intencas agi en tiu ĉi senco kaj petas la aliajn landajn sekciojn, sekvi laŭeble tiun ĉi ekzemplon, ke la celo - nome la reaktivado de IFEF-junularo kaj vasta kunlaboro kaj kontaktoj de la ĝejunuloj - povos realiĝi kiel eble plej frue.

Ni ripetas por rememorigo: Ne temas pri pago de la tutaj kostoj flanke de la landaj asocioj, sed nur pri financa kontribuo (simile al la elspezoj por la landaj komitatanoj kaj delegitoj).

Aŭstria Fervojista Esperanto Federacio - AFEF.

## EL NIAJ LANDAJ SEKCIOJ

### Japanio

Estraro de JELF

Sekretario:

S-ro NOBUKI Naosuke  
Fujihara-hikarimati 3-7-4, 703-Okayama

Kasisto kaj  
redaktoro:

S-ro UDA Kenkiti  
Mizunomi 1412, 720-Fukuyama

Prezidanto:

S-ro KUSUDA Zensuke  
Kandakitadori 7-195, 660-Amagasaki

## NORVEGIO

ATENTU!

GRAVA

NOVAĴO!

Ek de

Aprilo

1980

Ĉiu

nova

eldono

de la

horaro

RUTEBOK

FOR

NORGE

havos

ĉi tiun

liston

de

klarigoj

pri la

SIGNOJ

en

Esperanto

\*

Ne

forĝesu

sciigi

viajn

amikojn

en alieĵ

landoj

Pri

tio!

## Klarigoj por la fervojhoraroj

|                        |                                                                             |
|------------------------|-----------------------------------------------------------------------------|
| .....                  | Trans Eŭrop-Ekspresso. Nur unua klaso.                                      |
| .....                  | Nur laborage.                                                               |
| .....                  | Nur dimanĉe kaj festotage.                                                  |
| Antaŭ la tempindikoj   | la trajno ne veturas ĉutage aŭ ĝi veturas nur dum certa tempoperiodo.       |
| Meze en la trajnkolono | la trajno ne haltas en la koncerna stacio.                                  |
| Meze en la trajnkolono | la trajno veturas laŭ alia itinero.                                         |
| .....                  | Rezervado de sidlokoj deviga.                                               |
| .....                  | Rezervado de sidlokoj deviga de la elstacio kaj de certaj survojoj stacioj. |
| .....                  | Rezervado de sidlokoj ebla.                                                 |
| .....                  | La trajno ne transportas registritajn pakaĵojn.                             |
| .....                  | La trajno nur haltas laŭbezono.                                             |
| Antaŭ la tempindikoj   | la trajno haltas nur por enrajniĝo.                                         |
| Antaŭ la tempindikoj   | la trajno haltas nur por detrajniĝo.                                        |
| Antaŭ la tempindikoj   | la antaŭan tagon.                                                           |
| Post la tempindikoj    | la postan tagon.                                                            |
| Limstacio kun dogan    | kaj pasportkontrola aŭ trajno kun survojo dogan- kaj pasportkontrola.       |
| .....                  | Ŝiplinio.                                                                   |
| .....                  | Aŭtobuslinio.                                                               |
| .....                  | Aviadilino.                                                                 |
| .....                  | Litvagono.                                                                  |
| .....                  | Kuŝvagono.                                                                  |
| .....                  | Trairaj sidvagonoj.                                                         |

|                                                    |                                                               |
|----------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------|
| En la stacikolono                                  | Restoracio.                                                   |
| En la trajnkolono                                  | Restoracia vagono.                                            |
| En la stacikolono                                  | Stacia bufero.                                                |
| En la trajnkolono                                  | Vendado de buterpanoj kaj trinkaĵoj en la trajno.             |
| La kvarangulo de la stacinomo                      | indikas la situon de la stacidomo.                            |
| Matervagono trajno kun limigita nombro da sidlokoj | kaj limigita spaco por pakaĵo. Bicikloj ne estas kunportataj. |
| Alteco en metroj super la marnivelo.               |                                                               |

Klarigoj rilate aliajn signojn, ciferojn aŭ literojn troviĝas sur la paĝo, kie ili estas uzataj.  
 Mallongigoj: Dgl. - ĉutage, Et. - eksprestrajno, Fr. - vendrede, Gl. - vartrajno, Hld. - dimanĉe kaj festotage, Ht. - rapidtrajno, Hvd. - laborage, Kvd. - laborage, Lt. - loka trajno, La. - sabato, Ma. - lunde, On. - merkredo, Pl. - pasaĝertrajno, Se. - dimanĉe, Ti. - merde, To. - jaŭdo.

## Klarigoj por ŝip- kaj aŭtobuslinioj

|       |                                                                                                   |
|-------|---------------------------------------------------------------------------------------------------|
| x     | La supraj klarigoj validas por ŝip- kaj aŭtobuslinioj. Rimarku jenajn esceptojn:                  |
| I     | Haltas nur laŭbezono aŭ aluras nur laŭ antaŭa interkonsento aŭ kiam estas pasaĝeroj por la loko.  |
|       | Ne haltas aŭ veturas laŭ alia itinero.                                                            |
|       | Rimarku krome kelkajn simbolojn kaj mallongigojn kiuj aplikiĝas nur en la ŝip- kaj aŭtobuslinioj. |
|       | Fervojkonekto.                                                                                    |
|       | Pramŝipo kun rekta surŝipenveturo.                                                                |
|       | La ŝipo transportas aŭtomobilojn. Ne rekta surŝipenveturo.                                        |
|       | Halto sen horindiko.                                                                              |
|       | Proksimuma horo, informcela.                                                                      |
|       | Loko sen kajo. Ekspedado pere de bato.                                                            |
| A     | Transporto de laboristoj.                                                                         |
| G     | Transporto de varoj.                                                                              |
| K     | Kombinata transporto de pasaĝeroj kaj varoj.                                                      |
| Korr. | Korekta en eldono n-ro . . .                                                                      |
| LA    | Transporto de lakto.                                                                              |
| P     | Transporto de pasaĝeroj.                                                                          |
| S     | Transporto de lernantoj.                                                                          |
| Skd   | Tagoj kiam instruiĝas en lernejoj.                                                                |

## LA REDAKTORO PETAS:

En IF/1 de 1981 mi ŝatus aperi-  
gi kalendaron pri la jarkunve-  
noj de la IFEF-sekcioj.

Tiucele mi petas la responsul-  
ojn de tiuj sekcioj: Bonvolu  
sendi al mi informojn koncizajn  
pri tiuj jarkunvenoj (datoj,  
lokoj ... almenaŭ).

Se eblas al vi, sendu tiujn in-  
formojn antaŭ la 15a de janua-  
ro por IF 1.

Se tiuj aranĝoj ne estas anko-

raŭ fiksitaĵ, mi aperigos ilin  
en IF tujkiam mi ricevos ilin.

Tiu kalendaro eble plifacilig-  
os la partoprenadon de IFEF-a-  
noj, kiuj ŝatus viziti vin.

NE RESTU IZOLITAJ. Helpu la  
kontaktojn inter IFEF-sekcioj.  
Informu pere de INTERNACIA FER-  
VOJISTO, kiu estas je via dis-  
pono.

Dankon.

Rd.

## INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO SKISEMAJNO

7-14. de februaro 1981

La nombro de partoprenantoj jam  
proksimiĝas al la "supra limo".  
Tamen kelkaj litoj estas anko-  
raŭ je dispono. Tuj post la No-  
va Jaro ĉiu aliĝinto ricevos al  
sia hejma adreso la informojn  
kaj ateston de rezervigo.

Programo dum la semajno estos  
proksimume sama kiel antaŭaj.  
Organizanto penos aranĝi la t.  
n. kviz-konkuron dum unu vesp-

ero; do partoprenantoj havu jam  
nun iom da scio pri nia lando,  
pri vintraj sportoj kaj movado  
en IFEF. Kelkaj jam starigis  
demandon pri la reguloj de IFES-  
aranĝoj. La partoprenantoj pri-  
pensu pri tio kaj bonvolu sen-  
di la proponojn al organizantoj.

Bonvenon al Bohinĵ!

Organizantoj

## LA INTERNACIAJ KONGRESOJ 1981

## 54a SAT-KONGRESO

La 54a SAT-kongreso okazos 1.-  
3. aŭgusto 1981 en Bazelo,  
Svislando.

Korespondadreso por ambaŭ aran-  
ĝoj estas:

54a SAT-kongreso, E. Döring,  
poŝtfako 225,  
CH-4003 Basel (Svislando).

La Postkongreso kaj internacia  
feriosemajno, organizata de la  
Turista Asocio de Naturamikoj  
Esperanto Fako (TANEF) okazos  
8.-15. aŭgusto en Luzern. Eks-  
kursoj kaj vizitoj de mondfam-  
aj regionoj plezurigos la par-  
toprenantojn.

Dukoloraj kongresaj glumarkoj  
estas jam haveblaj. Akiru ilin  
kaj varbu per ili por la kon-  
gresvizito! 1 folio kun 12 mar-  
koj kostas SFr. 1.50 + afranko,  
aŭ sendu 2 internaciajn respond-  
kuponojn al: 54a SAT-kongreso,  
poŝtfako 225, CH-4003 Basel.

## 66a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Brazilio (Brazilo) 1981 07 25 - 08 01

Konstanta adreso:  
Nw Binnenweg 176,  
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK:  
Caixa Postal 04-0406, BR-70000  
Brasilia (DF), Brazilo.

Protektas la prezidento.  
Kiel Alta Protektanto de la 66a UK konsentis roli la prezidento de Brazilo, João Baptista de Oliveira Figueiredo.

no José Lins de Albuquerque, multjara esperantisto.

Senatano prezidas en LKK.  
La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas vicedestro de la reganta partio en la brazila Senato kaj, sekve, tre grava persono en la politika vivo de la lando. Temas pri senata-

Jam preskaŭ sepcent!  
Pro la escepte frua varbado de aliĝoj por la 66a UK, la nombro de aliĝintoj estas eble rekorda por tiel frua dato en la antaŭkongresa jaro, verŝajne aŭgurante rekorde grandan ekster-eŭropan Universalan Kongreson. Ĝis 1980 10 16, registriĝis 672 aliĝoj el 43 landoj.

Kongreskotizoj en guldenoj, ĝis:

| Periodo: | 80.12.31<br>unua | 81.03.31<br>dua | 81.06.13<br>tria |
|----------|------------------|-----------------|------------------|
|----------|------------------|-----------------|------------------|

|                                                              |     |     |     |
|--------------------------------------------------------------|-----|-----|-----|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA .....               | 180 | 198 | 216 |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro .....     | 158 | 176 | 194 |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo | 125 | 143 | 161 |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 .....               | 126 | 139 | 151 |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 .....          | 111 | 123 | 136 |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara                              | 54  | 60  | 65  |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara .....            | 90  | 99  | 108 |
| 8. Blindulo .....                                            | 72  | 79  | 87  |

Post la 13a de julio 1981 aliĝoj ne plu estos akceptataj, kaj la aliĝintoj devos pagi surloke en la kongresejo laŭ la koncerna tarifo de la tria periodo plus krompago 40 gld.

Internacia Junulara Kongreso en Meksiko. La 37a IJK estos la dua ekster Eŭropo, post la 21a IJK (1965) en Oocu, Japanujo. Ĝi okazos en la feriejo Oaxtepec, 78 km for de la urbo Meksiko. Aliĝilo estos baldaŭ havebla ĉe la konstanta adreso, kaj eliros kune kun baldaŭa numero de KONTAKTO.

## KIAMANIERE PLIVIGLIGI E-LABORON EN E-GRUPO ?

Ĉi tiu frazo komencis esti baza ŝtono de multaj diskutoj en nia E-loka grupo en Ĉeska Třebová (Ĉeĥoslovakio) jam antaŭ 17 jaroj. Post longa diskutado fine sekvis la decido: kontakti E-grupojn en najbaraj urboj, kune kun ili efektiviĝi kolektivajn renkontiĝojn. Unue ni petis kunlaboron kun du urboj; la unua estis 12 km, la alia 30 km malproksime de Ĉeska Třebová. Kaj tiel komenciĝis ĝemeligo de niaj E-grupoj. Poste aliĝis al la kunlaboro ankoraŭ tri aliaj urboj. Komence la kunvenoj estis duontagaj kaj ne-regulaj, sed ekde lastaj tri jaroj la kunvenoj okazis jam regule ĉiun duan monaton. La dumkunvena agado plilongiĝis por la tuta tago kaj ilia efektiviĝo alterniĝas laŭ la urboj. La renkontiĝoj iĝis riĉaj je partoprenantoj, kaj la nombro de interesuloj lastatempe atingis eĉ pli ol 60 gesamideanoj.

La programon preparas ĉiam la gastiganta E-grupo. Ĝi konsistas el du fundamentaj partoj: unue ekskurso en iun konatan kaj eminentan urbolokon, ekzemple en fabrikon aŭ historiaĵon, aŭ iam oni okazigas renkontiĝon kun iu en la urbo fama persono; la dua parto entenas viglan programon kun kantoj, poemprezentado, komunaj ludoj ktp. Diversaj konkuroj, projekciado de interesaj diapozitivaj, lotumado pri valoraj premioj kaj aliaj amuzaĵoj estas preskaŭ neforigbla parto de la kunveno. Neniam mankas informoj pri la laboro de unuopaj E-grupoj, enhavataj pasintan dumonatan agadon de la grupoj, kaj plue gravajn informojn el la komitato

de ĈEA. La menciitaj renkontiĝoj estas ege utilaj, ĉar ili ne nur devigas amuzi unula alian, ne nur la amuzon akcepti, sed ili ankaŭ profundigas sinceran amikecon inter Esperantistoj.

Dank' al vigla aktiveco de E-grupoj ni vizitis jam modernan teledirektan turon de fervoja stacio, bier- kaj tabak-fabrikon, ni renkontiĝis kun la filino de fama, eminenta jam mortinta ĉeĥa pentristo Max Švabinský kaj vizitis ladomon, kie la pentristo vivis. Tre interesa montriĝis ankaŭ la renkontiĝo kun partizanoj, kiuj dum la dua mondmilito batalis kontraŭ la faŝistaj malamiko.

Lastan, programe interesan kaj esceptan renkontiĝon preparis gesamideanoj el Ĉeska Třebová.

Ili preparis 13 aŭtomobilojn kaj kungesamideanoj el ĝemelaj E-grupoj realigis pli ol 70 km longan vojaĝon. Dum vojaĝe ili vizitis interesan muzeon de punktoj en urbo Vamberk, ĉerman naskiĝdomon de ĉeĥa patrioto en urbo Dobruška kaj tutlignan admirindan preĝejon el la XV-a jarcento. La posttagmeza programon ili efektiviĝis en kastela restoracio de urbo Náchod, kie oni ankaŭ bonvenigis la tieajn E-istojn.

Ĉiuj partoprenintoj antaŭĝojas je sekvonta renkontiĝo kaj kredas, ke ĉi tiu aktiveco ankoraŭ longe daŭros.

Jiri Pištora.



## ANKAŬ AKADEMIANO POVAS ASPEKTI ANSERO

Ĉu vere? Tie? Nepre ne!  
 Sed jes! Sendube! Ve, ho ve!  
 Pro hont' ruĝiĝas la vizaĝo:  
 Jen, sur la sesdek-naŭa paĝo,  
 En eta artikolo mia -  
 Ĝuste pri lingvoscio plia! -  
 Eterne por IFEF-arkivoj -  
Jen mankas du akuzativoj!  
 Ĉu pres-eraro? Tajp-eraro?  
 Ĉu dum verkad'? Sed jen la faro!  
 Jen mi konfesas al publiko  
 pri peko kontraŭ gramatiko.  
 Mi scias, ke mi verkis haste.  
 Ĉu nun mi devos penti faste?  
 Ĉu ĝuste kion mi predikis  
 Mi tiel peke ne aplikis?  
 Ho ve! Ho kulpo mia! Jes!  
 Jen vera fuŝo kaj forges'.  
 Kun granda sento de malgloro  
 Mi petas de la redaktoro  
 Pardonon pro ekzemplo fia  
 Tiel groteske ironia,  
 Kaj ankaŭ de la fervojistoj -  
 De ĉiuj laŭ la longaj listoj.  
 Nu, estas tamen saĝo-krono  
 Rekrei Bonon el Malbono;  
 De Akademianina sperto  
 Utile kresku nun averto:  
 Ke en verkado tro rapida  
 Ekzistas risko pretervida:  
 Por iu ajn, en ajna rolo,  
 Gravas la devo de KONTROLO.  
 Marjorie Boulton  
 (en blanka tolo kun kandeloj)

## NOTO DE LA REDAKTORO

Verŝajne ĉiuj, kiuj partoprenas la ellaboradon de la Bulteno sentas sin kulpaj pro tiuj 2 eraroj, kiujn vi rimarkis eble sur paĝo 69 de IF 4 .....

Ili do sekvu Marjorie Boulton, ankaŭ en blankaj toloj kun kandeloj ..... ĉar estas vero, ke .....  
"Gravas le devo de KONTROLO."

## FERVOJA KORESPONDA SERVO

F.K.S. celas havigi al siaj membroj, same al kurso-gvidantoj kaj komencantoj (fervojistoj aŭ ne) diverslandajn korespondantojn laŭiliaj deziroj. Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribigi sin. Ĉiu persono, kiu deziras informojn aŭ ricevi adresojn, aldonu internacian respondkuponon (aŭ francajn poŝtmarkojn), por ĉiu dezirata korespondadreso, ĉar F.K.S. ricevas nenian subvencion. Tiuj, kiuj havas problemojn por akiri internacian respondkuponon, povas tamen aliĝi senpage al F.K.S.

Senhezite enskribigu vin ĉe:

Fervoja Koresponda Servo  
(F.K.S.):

adreso:  
J. Demissy,  
18 avenue du Lieutenant Bour-  
guignon,  
F-55600 Montmedy (Francio).

Indiku vian nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras korespondant(in)ojn, kaj pri kiaj temoj ktp.

Ĉiu subskribint(in)o certigu  
respondi almenaŭ unu fojon!

Fervoja angulo

## NE CIUTAGA EVENTO

Feliça fino inter la reloj

Dum sia ĉiutaga kontrolado en la manovraj trakoj de la stacio Büchen la enketoficiisto malkovris etan fenikuron, kiu daŭre flugis al kaj de la kava bufro de franca varvagono starante tie. Tiu ĉi vagono estis ŝarĝita per eksterprofila kargo kaj estis preta baldaŭ fcruli al la najbara fervojo laŭ ties postulo.

Post kelkaj tagoj ella aperturo de la bufro pendis tuteta herbero, certa indiko, ke la bufro estis elektita kiel infanĉambreto. Post esplorado oni konstatis, kekvar ovetoj ene kuŝis por esti kovataj. La vagono ek de nun ĉiutage aparte estis kontrolata, kaj la manovristoj traktis ĝin kiel kрудan ovon.

Sed kio nun okazus, se subite  
la vagono estus forvokata kaj la  
kovanta fenikuro devus kunruli

tra GDR kaj Ĉeĥoslovakio ĝis Hungario? Nepre necesis malhelpi tian malagrablan sorton. Translokigo de nia fenikuro al orienta Eŭropo estis ekster ĉiu diskuto, ĉar eĉ plej diplomataj internaciaj kontaktoj apenaŭ havigintus rezulton ĉi-kaze.

Tre atente oni nun observis la  
situacion en la kava buŝo, kaj  
faris planon, kiel agi, kiam ne-  
cese. La timita tago de la ek-  
kulado venis pli rapide ol at-  
endite. Ĝuste dum tiu tago la  
birdetoj estis elovigintaj.

Sed nun la fervojistoj aktiviĝis kaj la plano por la "horonulo" ekvalidiĝis: Tre rapide la buroo estis demuntita kaj enstaltita per alia. Singarde oni metis la "birdbufron" surkeston inter la trakoj. Ambaŭ birdgepatroj tuj komencis nutri siajn idojn. Kvankam ĉirkaŭe rulis la trajnoj kaj daŭris la

manovrado, ĉiuj kvar idoj fariĝis flugpovaj.

kiu ne akordiĝis kun la kutima fervoja ĉiutago, trovintis ĝojigan finon.

Iumatene la nesto estis malplena. Niaj fenikuroj kun siaj idoj estis forflugintaj. Afero,

trad. el la germana porfervojista revuo "Wir" de J. Giessner

## VERKO DE EJFELO EN MORAVIO (ĈEĤOSLOVAKIO)

(El gazeto "Mladý svět")

Vojaĝante per trajno el Brno al Znojmo, en la km 23, antaŭ la stacio Moravské Bránice oni transveturas valon de rivero Jihlava, kvardekojn da metroj: profundan. El la fenestro de la trajno oni povas ĝui sole la profundecon de tiu ĉi valo. Sed la teknika monumenteco de la ŝtala viadukto estas videbla nur de malsupre, el la valo mem, tra kiu ankaŭ ŝoseo paralelas kun la rivero.

Malmult-iu scias, ke surtiu ĉi viadukto estas subskribitaj francaj inĝenieroj, gvidataj de Aleksandro Gustavo Ejfelo, la projektinto de la Ejfelo-turo en Parizo. Estas eĉ eble diri, ke la ponto apud Moravské Bránice, kiu estis konstruata en la jaroj 1886-1870, estis unu el la ŝtupoj, per kiuj Ejfelo perfektigis ĝis al la grandega (kaj en la tempo de ĝia konstruado - antaŭ jaro 1889 - ege pridiskutata) simbolo de Parizo.

La origina ponto, longa 373,5 m, ĝis hodiaŭ servas al sia celo, sed oni povas diri, ke ĝi fendiĝas en siaj kunfiksaĵoj, resp. en la nitoj. Ĝi ne plu kapablas servrezisti la nuntempan trafikon kaj ankaŭ la tempo mem ne malzorgis erodi ĝin. Tial en senpera proksimeco kreskas nun ĝia similulo - moderna viadukto. Ĝi estas ankaŭ ŝtala, 382,2 longa kaj ĝi pezas 2557 tunojn. Oni finis ĝian muntadon, kiun oni komencis en septembro 1974, la 31.8.1976. La alteco super la akvonivelo de la rivero estas 37 m.

KČ

Rim. de la tradukanto: la malnova ponto estas lege protektata kiel teknika memoraĵo kaj restos daŭre konservita.

## Gravaj enhavaĵoj

|                                                  | paĝoj |
|--------------------------------------------------|-------|
| Artikolo de la IFEF-Prezidanto J. Giessner ..... | 90    |
| 33a Kongreso de IFEF .....                       | 91    |

La redaktotfino por la venonta IF estas 15.1.81.



Preso: Esperanto-Centro Aarhus, Dk-8000 Århus C